

AMERIKA ESPERANTISTO

AMERICAN ESPERANTIST



La Monata Bulteno de la Esperanto.

Asocia de Norda Ameriko

Joseph R. Scherer, President

Los Angeles, California

Joseph Leahy, Gen. Sec.

Paterson, N. J.

Centra Oficejo 1517-H-Street, N. W., Washington, D. C.

VOLUME 4^o No. 2 - 10¢ per copy - \$1.00 per year - December 1935

MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR - - - - - DETROIT JULY FIRST SECOND and THIRD
1 9 3 6 - 29th ANNUAL CONGRESS E. A. N. A. - 1 9 3 6

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

POR LA 15. DECEMBRO: "Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion" - jen la evangelio de la kreinto de Esperanto.

Eble ne estis hazardo, sed destino, ke la nobla animo de D-ro Zamenhof naskiĝis nur dek tagojn antaŭ Kristnasko - ĝuste dum la tagoj kiam la homoj komencas pensi pri "paco sur la tero".

1859 jarojn pli frue alia granda majstro naskiĝis. Li poste predikis kaj montris kiel akiri pacon kun Dio, pacon en la koro, kaj pacon sur la tero. Lia verko kaj kreaĵo - nova granda religio-hodiaŭ vivas en la tuta mondo.

Sed tro baldaŭ la homoj nur kun la lipoj estis Kristanoj. En diversaj epokoj ili - kristanoj - batalis kaj militis inter si plej terure, ĉo pli furioze ol bestoj.

Mankis al ili komuna lingvo kiu ebligas personan, intiman kontakton inter unuopaj homoj de diversaj nacioj. Ili ne obeis la instruojn de Kristo - sed male ili estis avidemaj kaj avaraj kaj ne sufiĉe idealistoj. Prezentiĝis ekonomiaj problemoj kiuj same forte kiel la manko de neutrala lingvo malhelpis la "pacon sur la tero".

D-ro Zamenhof donis al ni ne nur lingvon sed ankaŭ internan ideon de idealismo, kiu diras al ni ke ĉiuj homoj estas fratoj - tute ne gravas kia estas la koloro de la haŭto aŭ kia estas la religio. Tiu sankta, granda ideo kiu instruas fratecon kaj justecon inter la popoloj estas preskaŭ malamike kontraŭa al la deziroj de la tro-avidemuloj kiuj volas fari ekonomiajn sklavojn el milionoj da homoj de la mondo.

Sed kiel la novaj-kaj malnovaj-Esperantistoj povas akiri tiun noblan senton de simpatia komprenemo por aliaj homoj? Unu grava vojo estas per la legado de taŭgaj libroj kaj gazetoj. Legu la verkojn de Zamenhof mem, aŭ tiujn de D-ro Privat pri la vivo de nia majstro kaj pri la historio de Esperanto. Sed la legado de kiu ajn bona Esperanto-libro aŭ gazeto helpas al vi iom post iom fariĝi idealisto, pli sperta Esperantisto, kaj pli lerta defendanto de nia bela idealo.

Kiel ni povus festi la naskiĝotagon de D-ro Zamenhof pli bone ol per la aĉeto de nova bele kaj kortuŝe skribita Esperanto-libro? Sur alia paĝo troviĝas listo de libroj rekomendataj de la estraro de EANA. Se vi ne jam povas posedi la novan libron je la 15. decembro..... tiam vi povas almenaŭ meti ĉekon en koverton por mendi unu aŭ kelkajn librojn. Bona Esperanto-libro certe estas la plej bela donaco por Kristnasko - por ĉiu Esperantisto. Tiel vi helpas la aŭtorojn, la eldonejojn, vin mem, kaj la homaron ĝenerale. La homaro ĝenerale profitos se vi faras el vi pli spertan Esperantiston, pli kompreneman, pli justan, pli idealistan - entute pli bonan homon - per la legado de bonaj Esperanto-libroj.

Al miaj multaj personaj amikoj tra Usono kaj al ĉiuj aliaj gesamideanoj en Norda Ameriko mi deziras plej elkoran "Ĝojan Kristnaskon" kaj plej sinceran "Feliĉan Novan Jaron".

Joseph R. Scherer
Joseph R. Scherer.

REPORT OF THE FINANCE COMMITTEE

(November 15, 1935)

Over 29% of our members have now responded to the Finance Committee's appeal for aid in reducing the Association's debt. In an effort to reach our goal of a 100% each member of the Committee is at present conducting a recanvass of those in his territory who have not replied. Last month we called attention to the fact that COLORADO was the first State to show complete returns. We are pleased to announce that her example has been followed by IOWA, RHODE ISLAND, and ARIZONA in the order named. Following is a list of the donations received during the past month:

ARIZONA. C.H.M.	\$2.00	\$ 2.00
CALIFORNIA. F.T.D.	5.00	5.00
CONNECTICUT. D.B.	1.00	1.00
WASHINGTON, D.C. F.A.T.	5.00; K.F. 8.50; S.C. 1.00; H.B.H. 10.00; R.H.		
	3.00	27.50
FLORIDA. E.L.C.	4.00; L.D.B. 1.00; T.H. 1.00; J.M.L. 1.00; A.J.K. 10.00	..	17.00
IOWA. N.D.M.	1.00	1.00
MAINE. L.N.T.	1.00	1.00
MASSACHUSETTS. F.M.W.	10.00; A.E.B. 2.00	12.00
MICHIGAN. J.H.M.	2.00; G.C.G. 1.00; R.L.D. 1.00; Mrs. R.L.D. 1.00	5.00
MINNESOTA. J.A.F.	1.00; J.K. 1.00	2.00
NEW JERSEY. L.A.W.	\$.5050
NEW YORK. P.R.W.	1.00	1.00
OHIO. L.S.	2.50; C.S. 1.00; E.S. 1.00; G.J. 1.00	5.50
PENNSYLVANIA. J.J.W.	1.00	1.00
RHODE ISLAND. C.M.T.	2.50	2.50
VERMONT. C.P.	2.00	2.00
WISCONSIN. F.A.H.	10.00	10.00
CANADA. D.R.P.	1.00	1.00
			<u>\$ 97.00</u>

Previously acknowledged (report of Oct. 15, 1935) 188.00
Total \$285.00

E.A.N.A. COMMITTEE CHAIRMEN 1935-36

Executive:- E. G. Dodge, 1301 Massachusetts Ave., Washington, D. C.

Finance:- Fred H. McMann, 169 Hoosick St., Troy, New York.

Propoganda:- Samuel C. Eby, 320 E. 42nd St., New York, N. Y.

Examinations:- Prof. Edwon L. Clarke, Rollins College, Winter Park, Florida.

Schools:- Prof. Louis Dormont, 123 E. 35th St., Brooklyn, N. Y.

Esperanto Press Service:- Woodruff W. Bryne, Director, 211 Wash., St., Atlanta, Ga.

NIA PREZIDANTO- Joseph R. Scherer, dum la tuta monato Novembro kaj parto de Decembro prelegas en Texas kaj Louisiana. Li revenos al Los Angeles por Kristnasko post for-esto de 22 monatoj-konstanta vojaĝado tra Usono kun sia "Ruliĝanta Hejmo Verda Stelo"-helpate de sia patrino. Dallas, li vizitis S-anon A.C. Scurlock, fama ad-vokato de la Texas urbo, ankaŭ alian novan samideanon S-ron Clarence Sibley. Ambaŭ promesis de nun vigle labori por Esperanto kaj fondi lokan movadon. Houston, li renkontis Sinjorinon E.F. Zirbel kiu daŭre laboras por la loka movado, instruas kaj varbas konstante.

BONAN KRISTNASKON KAJ FELICPORTAN NOVJARON

X
 "ALL STUDENTS planning to MAJOR in LANGUAGES in SANTA PASADENA, ARE REQUIRED to
 STUDY A SEMESTER of ESPERANTO". (from John S. Munson, Pasadena, Calif.)
 X

ESPERANTO-KLUBO DE LA UNIVERSITATO DE ILLINOIS.

La esperantistoj ĉe tiu universitato, en la urbo Urbana, kunlaborante kun la Universitata Porvira Kosmopolita Klubo, efektivigis antaŭnelonge la aperon de S-ro Jozefo R. Scherer en du ilustritaj prelegoj, en la unuversitata halego. Li estis gasto de la Esperanto-Klubo ĉe speciala kunveno, kaj disaŭdigis parolon sur la universitata radio-stacio, WILL; ankaŭ prelegis publike pri la uzo de Esperanto ĉie ĉirkaŭ la mondo. S-ro Scherer kaj D-ro G.P.Ferree (pioniro de Esperanto en Urbana) farigis honoraj membroj de la klubo. Tiu klubo havas interesan esperantan ekspozicion en la biblioteko de la unuversitato. Klaso por komencantoj ricevas instruon, kiel dum pasintaj jaroj.

"L A V I R O K U N L A Ŝ A R K I L O . "

MARKHAM'S "THE MAN WITH THE HOE" Done Into ESPERANTO.
 by Professor George Winter Mitchell

Kurbita per la pezo de jarcentoj
 Li kliniĝas sur ŝarkilo, kaj la teron
 Fikse rigardas; en lia vizaĝo estas
 La vakeco de l' epokoj jam pasintaj,
 Sur lia dorso la ŝarĝo de la mondo.
 Kiu lin igas nesentema al ravo
 Kaj malespero, aĵon kiu nek
 Malĝojas nek esperas, malviglan
 Kaj stultan, kvazaŭ fraton de la bovo?
 Kiu do malfirmigis kaj pendigis
 Tiun ĉi brutan makzelon? Kies estis
 La mano kiu reklinigis tiel
 La lian frunton? Kies spiro estis
 Kiu estingis la lumon en tiu cerbo?
 Ĉu tio estas l'Aĵo kiun Dio
 Faris kaj igis regi sur la tero
 Kaj ĉe la maro; koni la stelarojn,
 Kaj serĉi la ĉielon pro potenco;
 Kaj senti la pasion de Eterneco?
 Ĉu estas tio ĉi la song' de Tiu
 Kiu la sunojn formis kaj ordigis
 Sur la antikva profund' iliajn vojojn?
 Malsupre en ĉiuj kavernoj de inferno
 Eĉ al ilia lasta golfo estas
 Nenia form' videbla pli terura -
 La atestaĵo de la avideco
 De homo - plena je signoj kaj antaŭsignoj
 Por la animo - pakita je danĝero
 Al l'universo. Kiom da golfoj estas
 Kiuj disigas lin de l'serafaro!
 Sklavo de l' rado de labor', al li
 Kio Platono estas kaj la vojo
 De Pleiades? Kio la longaj pintoj
 De kant' al la ĉielo atingantaj,
 La fendo de tagiĝo, la koloro

De la bonodora rozo ruĝiĝanta?
 Tra tiu ĉi timega form' l'epokoj
 Rigardas per okuloj suferantaj;
 La tragedi' de tempo videbla estas
 En tiu doloranta dors' kurbita;
 Per tiu ĉi timega Form', homaro
 Rabita, perfidita, profanita,
 Kaj senheredigita laŭte krias
 Proteston al la povoj kiuj faris
 La mondon - proteston, ankaŭ profetaĵon.
 Ho mastroj kaj regantoj en ĉiuj landoj,
 Ĉu estas tio la manfaritaĵo
 Kiun vi donas al Dio, tiu aĵo
 Tre distordita, preskaŭ sen animo?
 Kiel vi povos rektigi tiun formon;
 Denove tuŝi ĝin je senmorteco;
 Refari en ĝi la muzikon kaj la sonĝon;
 Korekti la antikvajn malfamegojn,
 Perfidajn malbonfarojn kaj mizerojn?

 Ho mastroj kaj regantoj en ĉiuj landoj,
 Kiel l'estonteco rigardos tiun ĉi?
 Kiel ĝi traktos liajn brutajn demandojn
 En tiu horo kiam ventokirloj
 De ribelado skuos la naciojn?
 Kaj kiel fartos je la reĝolandoj
 Kaj reĝoj de la mondo - je tiuj povoj
 Kiuj lin formis en tian brutan aĵon -
 Kiam ĉi tiu muta Terur' leviĝos
 Por juĝi nin post jarcentoj da silento?

BRAZIL POST OFFICE DEPARTMENT has issued a beautiful new Commemorative Postage Stamp of 200 Reis value-text printed in two languages -- Portuguese and Esperanto.

Mankis spaco en la novembra numero por tiuj spritludoj, ĉar la paĝoj estis plejparte dediĉataj al represo de la fundamenta "Statutaro" de EANA. Sed ĉi-monate ni kaj promesas kaj anoncas kaj raportas.

Pri la venonta (januara) numero, ni promesas al niaj legantoj la aperon de bela "cross word puzzle" en Esperanto, konstruita de fervora samideano en Kanado.

En la nuna numero ni proponas ke ĉiuj interesataj traduku en Esperanton la propagandan artikoleton titolata: "Esperanto as a Means of Culture." (Vi trovos ĝin sube.) La premioj estos ja malgrandaj, ---nur libretoj, surskribotaj je memoro de via sukcesa partopreno en la konkurso. Unu premio por la plej taŭga traduko de la tuta artikoleto; unu premio por la plej korekta traduko de la komenca parto (ĝis la kvin steloj) verkita de nova samideano kiu komencis la studon de Esperanto post la komenco de Julio, 1934-a; unu premio por traduko de la komenca parto fare de juna Esperantisto kiu ankoraŭ ne atingis la 17-an datrevenon de sia naskiĝo. (Bonvole sendu viajn tradukaĵojn al S-ro H.W.Hetzel, 119 So. 37th St., Philadelphia, Pa. Li devas ricevi ilin antaŭ la Kristnaskfesteno.)

Pri la oferitaĵoj en la oktobra konkurso ni nun raportas. S-ro Hetzel, la juĝanto, skribas ke la proverboj en la oktobra numero ne incitis tiom da konkursantoj kiel la septembra, ĉar la postuloj de la nuna laboro estas evidente pli malfacilaj; sed ke "kvar estis sufiĉe kuraĝaj por fari la proven." Tiuj estas Wm. Vathis, Mauch Chunk, Pa.; Albert M. Koliner, de la "Esperanto Printing Co.," Detroit, (kiu estas plibone konata per sia plumnomo, "Seman Tarano"); J.A. Forsell, White Bear Lake, Minn.; kaj A.E. Regal, Chicago. (La unuedirita konkursanto ne rimarkis ke ĉiu tradukaĵo devas esti per dulinia aŭ kvarlinia poemeto.) La juĝanto donas la unuarangan decidon al S-ro Koliner, kaj duan lokon al S-ro Forsell.

Sube vi povos legi kaj ĝui la plej interesajn tradukojn; vi ankaŭ trovos tradukojn verkitajn (ne por konkursa celo) de la aranĝinto mem de ĉi tiu konkurso.

Why do I study Esperanto?
Just because I dearly want to.

"Kial Esperanton studas mi?
Ĉar min fortege elogas ĝi." (Forsell.)

"Kial gaje mi laboras, studas lingvon
Esperanto?
Nu, mi vere ĝin favoras, ĝi al mond'
estas benanto." (Regal.)

"Kial de la lingvo bela
Esperanto
Estas mi lernanto?---
Mi ĝin studas, ĝin parolas,
Ĉar kun am' mi tiel volas." (Tarano.)

"Kial mi Esperanton studas?
Ĉar en la studo la koro ludas."
(Egodo.)

There's many a slip 'twixt the cup and the lip.
But better the slip than a poison sip.

"Se ofte pokalon maltrafas la lipo,
Vivon ĝi savas de venena trinketo." (Forsell)

"Elversigis la supo, --ho, kia ĉagren'!"
Sed pli bone sen sup', ol kun gut' da
venen'!" (Tarano.)

When self-seeking demagog dupes "the masses,"
He flatters, but thinks in himself "Them asses" favor'!"

"Kiam demagogo parolas: 'Ho vi, a-mi-kar-o,'
Li flatas kaj pensas: 'Ho vi, for-mik-ar-o.'"
(Tarano.)

"Pokulo avidata versigas ofte for.
Sed se venen' ĝi estas, la perdo jen
(Egodo.)
"Demagog' flataĉas ĉie, sur montoj kaj
ĉe valoj.
Li nomas nin amikoj, kaj pensas nur:
'ĉe-valoj'!" (Tarano.)

"Sofisto, trompante laŭ kutimaj roloj,
Parolas al malaltranguloj.
Li flatas, dirante: 'la noblaj popoloj!'
Sed pensas: 'nebulaj la puloj!'" (Regal.)

"Demagogo sinservema per trompado de
la 'multaj,'
Logas ilin tre flatema, sed interne
pensas: 'Stultaj'!" (Egodo.)

Many men, many minds.
But truth is his, whoever finds.

"Kiom da kranioj, tiom da opinioj.
Sed veron diri povas, kiu ĝin nur
trovas." (Tarano.)

"Ĉiu ĝiam homarero propra laŭ pensoj
sin movas.
Sed la ununura vero estas ties, kiu
trovas." (Egodo.)

Nun sekvas fina raporto pri la septembra konkurso. (En la antaŭa numero ni anoncis la kvar venkintojn.) Ĉar la angla vorto "got" estas, laŭ popola uzo, treege idiotisma, kompreneble ĉiu "GOT"-enhava frazo povas esperantigi laŭ diversaj manieroj. Sube vi trovos, por ĉiu el la anglaj frazoj, du-tri aprobatajn tradukojn.

Have you got any fresh bread yet today? "Ĉu vi havas ankoraŭ iom da freŝa pano hodiaŭ?" "Ĉu vi havas freŝan panon hodiaŭ?" "Ĉu vi jam ricevis hodiaŭan provizon da freŝa pano?"

I've got to go at once. "Mi devas tuj iri." "Estas necese ke mi foriru tuj."

He got home at midnight. "Li venis hejmen je noktomezo." "La alvenis al sia domo noktomeze." "Li enhejmiĝis meznokte."

Her brother got killed in an accident. "Ŝia frato estis mortigita en akcidento." (Ankaŭ: "pro akcidento.") "Ŝia frato mortigis per akcidento."

Her husband got to drinking. "Ŝia edzo ekdrinkadis." "Ŝia edzo drinkemiĝis." "Ŝia edzo iĝis drinkema."

The dog has got the rabbit. "La hundo estas kaptinta la kuniklon." "Jam kaptis la hundo la kuniklon."

He got mad at me. "Li ekkoleriĝis je mi." "Li koleriĝis kontraŭ mi." "Li pleniĝis je kolero je mi." "Mi koleriĝis lin."

He got up early that morning. "Fruĝli ellitiĝis tiumatene." "Li leviĝis frue tiun matenon."

She got herself up to look like a Gypsy. "Ŝi vestis sin por simili ciganinon." "Ŝi sin vestis por aspekti kiel cigano." "Ŝi fariĝis per vestaj arangoj ciganaspekta."

Fina vorto. Ne forgesu tralegi -- kaj traduki -- la suban artikoleon.

ESPERANTO AS A MEANS OF CULTURE

Esperanto is not, and has never been, a mere "fad." It is a high intellectual and moral exercise. And certainly, had it lacked the many loyal pioneers, far seeing and self-sacrificing, who from the beginning recognized in a simple and neutral international language one of the greatest means for dispelling prejudice and awakening the sense of human kinship, Esperanto would never have survived its infancy nor have grown in spite of all obstacles to its present stage of relative maturity. All honor to the devoted workers, past and present!

But in winning for Esperanto that more general acceptance which is imperative for its full success, we must seek and welcome many learners who will approach the study from practical motives, even though lacking this higher idealism. The public generally must come to realize that a knowledge of Esperanto is a fine cultural accomplishment, just as truly as the knowledge of Spanish or German or French. And one which, in proportion to the time devoted to it, pays even larger and more immediate dividends in culture than they. This early ripening of the cultural harvest comes largely because the language is self-consistent and logical, both in grammar and in word formation and word meanings. Neither does it confuse the mind and overburden the memory, as do the national languages by their long conjugations, irregular verbs, and countless "exceptions." *****

Few of us before we begin the study of some language in addition to our own mother tongue ever realize how full of "idoms" our English is, nor in how many cases a number of unrelated ideas are expressed (should we not rather say "confused"?) under a single English word. A thorough study of any second language gives one a clearer and more appreciative comprehension of his native English. But from the study of Esperanto one begins to reap this benefit almost from the first lesson, because so little preliminary study is needed before one gets started in the reading of connected discourse, or even in connected writing.

Emphatically also there are other cultural values in Esperanto. Not to be forgotten are Esperanto song and poetry, the facile reading of translated literature, the broadening of mental outlook through contact with correspondents or magazines in diverse parts of the world.

If we have recognized these things, let us practice and preach them!

ESTRARO DE E.A.N.A. deziras al ĉiuj Esperantistoj Ĝojan Kristnaskon, Feliĉan Novan Jaron.

"Fourteen Facts about Esperanto", by J. J. Sussmuth-Preface by J. D. Sayers. Price 10¢. A booklet of 20 pages, containing useful information concerning Esperanto. A German edition is also published, without Mr. Sayers' foreword, at the same price. Published by the American Esperanto Institute, Madison, Wisconsin.

A CLOUD OF GLOOM is over Washington Chapter EANA and the Central Office--Miss Jane Schiffman, one of our most active workers, has moved to New York. She has the best wishes of all who knew her.

The newly organized Canadian Esperanto Association has selected the following officers

Honorary President-Elven J. Bengough, Hon. Vice President-Miss Marshall Saunders, C.B.E., M.A., President-Norman A. Todd, 603 Lister Block, Hamilton, Ontario. Vice-Pres., Edgar S. Mould, 83 Yarmouth Road, Toronto, Ont., Secretary David R. Pook, 277 Salem Ave., Toronto, Ont. Best wishes.

THEY WANT ESPERANTO. We clip the following item from the New York "SUN" Oct. 22, '35: "Students of the New Lots High School are petitioning the Board of Education to include the study of Esperanto in the high school curriculum with the same credit allowance toward graduation as is granted for foreign languages. One thousand students asked for the inclusion of the subject as an accredited study in the high school curriculum, and Four Hundred and Forty offered to take the course as soon as credit is granted. A group of students are now studying Esperanto at New Lots as an extra-curricular activity".

Prof. Louis Dormont of Brooklyn, N. Y. is the ACTIVE leader of the Esperanto movement above referred to. If we had enough Louis Dormonts to go around, we would be reading articles like the above in the newspapers of every community in North America-or elsewhere. Amata Professoro, ni salutas vin.

CONGRATULATIONS to a few more REAL ESPERANTISTS who have recently passed successfully the examination for KAPABLECO:-Louis Dormont, Brooklyn, N. Y., Joseph W. Dubin, Philadelphia, Pa., Thomas A. Goldman, Washington, D. C. (now attending Harvard University) Who is next? Many wanted.

PAINLESS ENROLLMENT If a dollar and a half looks like too big an outlay all at once, drop a nickel, dime or quarter into a box, drawer, etc., a few times a week. You'll be surprised how soon, and easily you will have enough to renew or become a member of the E.A.N.A. Students pay 10¢ at each lesson and at the 15th they are full fledged members. ALSO-and this should be in very large CAPITALS-in saving up for the DETROIT CONGRESS, OH BOY!

ZAMENHOF BIRTHDAY. A day all Esperantists celebrate, (Dec. 15th), and observe that good old custom of buying at least one new book. Here are some exceptionally fine offerings: "Plena Gramatiko" de Kaloosay & Waringhien, \$2.50. "Landoj de Fantazio" de Teo Jung, \$1.40 "Amo en la Jaro 10.000", \$1.75. "Nenio Nova en la Okcidento" de Remarque, \$2.00. "Encyclopedio de Esperanto" 2 Vol. 600 Pagoj, 761 bildoj, \$7.25 1 Vol. sen bildoj, \$4.25.

La supraj prezoj estas inklus've de la sendkostoj.

Lack of space prevents listing of a few others. Inquiries are welcome.

 ALL ESPERANTISTS will be sorry to learn of the serious illness of one of our most ardent and respected members - Miss Mattie Wadsworth, Hallowill, Me.

Of course you've all noticed that great big "I can't-help-it" smile that M.C. McConkey -Detroit-is carrying around--NEW McConkey BOY arrived Oct. 1st. Congratulations to the McConkey family - Let the good work go on.

LA ROMA KONGRESO. Ni bedaŭras ke nia malgranda spaco malpermesis la presadon de Kongresaj raportoj, sed ŝajnas ke la Kongreso, kvankam iomete konfuza en kelkaj rilatoj, estis tre kontentiga je aliaj. La vojaĝo en Afriko kaj la nokto en la dezerto estis tre malkomforta, laŭ ĉiu partoprenanto-la ŝipo estis homamasigita kaj la temperaturo atingis 120 F, sed kelkaj el la vojaĝantoj diris ke ne por io ajn ili estus perdinta la sperton. Sep usonanoj ĉeestis la Kongreson S-ro Fred Hamann, Wauwatosa, Wisc.-la oficiala delegito de EANA., kaj lia edzino; S-ro S.C. Eby kaj edzino, el Novjorko; Otho Williams, Am. Express Co.; Curt Stoeckert, el Brooklyn, kaj Jerome G. VanZandt, oficiala delegito de la Klubo de Los Angeles. S-ino Leona Chase, Sek. Kor. de la klubo, skribis nin ke li transiris Usonon automobile, transportis la automobilon al Cherbourg kaj traveturis Eŭropon. Liaj raportoj al la klubo faris gravan impreson je la samideanoj hejme precipe rilate al la granda nombro da ĉeestantoj kaj la multe disvastigata oficiala uzado de Esperanto en Eŭropo. S-ro VanZandt parolis pri la Kongreso antaŭ la Virina Klubo de Hollywood, kaj alie, kaj ornamis siajn prelegojn per multaj rakontoj kaj sin mem per brila Dalmatia kostumo.

La LOS ANGELES KLUBO, la 9-an de Novembro akceptis kiel Honora Membro, ĉiuel tri vizitantoj, nome, S-ro Edmond Sjekely, el Cluj, Rumanio, S-ro Weaver el Londono, Anglujo, kaj S-ro Marchal, el Tahiti.

 "Belga Esperantisto", oficiala organo de Reĝa Belga Ligo Esperanto, carries on first page of recent edition, an attractive portrait of the Late Queen Astrid, killed in an automobile accident.

Just received the sad news of the death of two well known Esperantists: Mrs. Julia Goldzier, Bayonne, N. J. and Charles U. White, Lindsay, Calif.

.....
 On another page is the Esperanto translation of Markham's "Man with the Hoe" by Prof. George Winter Mitchell, recently deceased.

S-ro Walter Poppeck, gvidanto de l'Gazetservo de G.E.A., Wusteglersdorf, Schles, Bahnhofse 4, Germany, multe deziras el la tuta mondo ricevi taŭgan materialon por la gazetaro-mallongajn artikolojn preferatajn. Tiun ĉi peton ni rekomendas al la samideanaro, ĉar niaj germanaj gefratoj havas nuntempe malfacilaĵojn rilate la disvastigon de nia afero, kaj klopodas per interesaj skribaĵoj regajni la tiean gazetaron por nia afero. H.B.H.

LUBBOCK, Texas, is making a bid for a "Place in the Sun" of the Esperantujo. J. F. Ward is organizing classes in the High School, with (so far) about 60 students.

TOPEKA, KANSAS - always a busy Esperanto center-is extra busy now-they have visions of some day, in the near future, staging the BIGGEST KONGRESO of EANA. With that incentive, Big Joe Thompson, of the Probate Court is teaching a large class of Boy Scouts, Miss Lovelia Hilty, teaches the Police force and Mrs. Hardy the balance of the population-and Rev. John H. Fazel keeps a fatherly eye on all of that section of U. S. A. 1938 Kongreso in Topeka!

MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR - DETROIT JULY - FIRST, SECOND, AND THIRD 1936
29th Annual Congress of the E.A.N.A.

ATENTU GESAMIDEANOJ:

La Oktobra-eldono de "A.E." jam informis vin, ke nia venonta kongreso en 1936 okazos en Detroit. La kongresa komitato jam estas organizita kaj komencis labori por nia afero. La komitata prezidantaro konsistas el samideanoj: Jozef H. Murray, prezidanto, Erich Kavel, sekretario kaj Edwin Sievers, kasisto. La aliaj komitatanoj estas la plej eblaj kaj idealaj samideanoj el nia rondo. Ĉiŭ el ni volas doni al la esperantistaro la plej belajn kaj mirindajn kongres-tagojn en la historio de la Amerika esperanta movado. La kongreso okazos Julio la 1-an, 2-an kaj 3-an. Ne estas necesa diri al vi, ke Detroit mem estas unu el la plej grandaj, vidindaj kaj interesaj urboj de nia nacio. Kaj preskaŭ ni jam bedaŭras, ke 3 kongres-tagoj ne estas sufiĉaj por montri al vi ĉion. Rilate al la kongres-programo la komitato invitas vin, sendi al ni viajn opinion kaj proponojn. Eble vi jam vizitis aliajn esp. kongresojn kaj kolektis spertojn, kiuj ni povus uzi iamaniere. Ĉu vi ne volus skribi al ni pri tio? Adresu viajn leterojn al sek Erich Kavel, 7609 Nevada Avenue Detroit-Mich. respondante la jenan demandon:

"Kiamaniere mi ŝatus vidi kaj partopreni Amerikan Esperanto-Kongreson."

SE VI ESTAS AMIKO de E.A.N.A. kaj U.E.A. PAGU TUJ VIAN KOTIZON

Many people from all lands are anxious to correspond, and small announcements like the following are to be found in all the foreign Esperanto papers. We get many requests from other lands for names of would-be correspondents.

We would like to insert all the requests-foreign or American-free:but paper, ink and time have to be paid for-hence our little 'charge' announcement below.

THE UNDERSIGNED wishes books, magazines etc., on visual instruction in exchange for Soviet books, magazines etc. Full value guaranteed. Also correspondence on visual instruction. Boris Toll, USSR Leningrad, Lesnaj pr.d.20 Kv. 116

"A Picture is Worth 1000 Words" Postage Stamp type (and size) Photographs, gummed ready to stick, from any picture. 100 for \$1.00, 500 for \$4.00 1000 for \$7.00. Original returned unharmed.

SAVE ON MAGAZINE SUBSCRIPTIONS-Club and Special Rates. Any offer matched. Any Magazine, Any Time, Any Where. New or Renewals. Send for list.

Unique Photographic Christmas Cards - - - - -Samples for a nickel.

PHOTOGRAPHS of DR. ZAMENHOF 5x7 25¢ 5 for \$1.00 8 x 10 65¢. Postage stampe size 15¢ doz.

Order from Esperanto Association of North America. 1517 H Street N. W., Wash., D. C.

Beginning January, 1936, "Scienca Gazeto" will be printed on 24 pages and a cover. Besides that, the first half of the magazine will be printed in larger and better type, and it will be illustrated. Thus we take three steps forward towards a bigger and better "SCIENCA GAZETO"

As heretofore, "Scienca Gazeto" will always be full of new and interesting information on matters of a scientific nature from all parts of the world.

A fourth step: Sample copies will be sent free. Subscription per year: only \$1.00 American Esperanto Institute. 556 State St., Madison, Wis., U. S. A.

Advertising rates for small announcements: Classified, 1¢ per word-minimum 25 words. Space, 2x3 1/2 inch, 50¢-3 insertions for \$1. 1/2 page \$3.00 Full Page \$5.00. Send copy by the 20th.

 EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

Esperanto Association of North America. 1517 H Street N. W., Washington, D. C.
 MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

Class I - Membership in EANA and U E A, with "Amerika Esperantisto" \$1.50
 Class II- Above combination, & Jarlibro (a directory of World Esperanto) added 2.75
 Class III Above combinations, & the monthly magazine "Esperanto" (\$1.75) added 4.50
 Come in any time-Your year begins the date of your receipt, (instead of Oct. 1st as formerly) (EANA with "AE" \$1.50) (Jarlibro, additional \$1.25) ("Esperanto", additional \$1.75) (Total \$4.50)

 TEXTBOOKS Dr. Reed's "Practical Grammar" - A course suitable for all grades 75¢

Prof. Kenngott's "Esperanto Course" speaks for itself-and teaches you. \$1.00
 (The authors of both above courses are recognized as World authorities on the lang.)

Prof. Kenngott's Pocket Dictionary-Two-way. A worthy companion to any course. 25¢

Froding's "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢

Sussmuth's "American Esperanto Key" - alphabet, grammar, & vocabulary 5¢

"Edinburgh Dictionary" Esperanto-English, English-Esperanto 288 pp. 4 x 6, \$1.00

Esperanto-English by E. A. Millidge. The English-Esperanto by Joseph Rhodes, a use-

BEST Esperanto Dictionary in any National Language. 500 pp. Price \$2.75 \$1.10 (547 pp)

Easy-and interesting reading: "Fabloj de Ezopo" 25¢, "Zamenhofa Legolibro 50¢, "Es-

peranto for the Globe-Trotter" two for 5¢ "Sub la Meznokta Suno" 25¢, "Sep Ridoj" 25¢

Ĉiutaga Vivo (Kenngott) 25¢ "Facilaj Esperantaj Legaĵoj" 50¢

GENERAL READING

La Vojo Returne (Remarque) \$2.00 Akrobato de Nia Singorino (Payson) 25¢

Esperanto por la Blinduloj .05 Blanche, Virgulino de Lille (Payson) 25¢

Unu-Bileto (Edogana) .25 Dua Kreanto. Poemo. (Sanjurjo) 10¢

Ĉu estas ebla kaj necesa Deveno de Esperanto L. L. Zamenhof. 10¢

Internacia Helplinĝvo .15 Infanmurdo (Japanese drama) 25¢

"Gis la Revido" Propoganda Playlet- .05 "Ĝinevra" (Privat.)

Juneco Kaj Amo (Boards) .50 (Paper) .35 "Miserere Kaj Thais" (Payson) 25¢

Lando de Argenta Akvo (Roe-Payson) .15 Radio Manuelo 25¢

Mopso de la Onklo (Chase) .15 Jos. Rhodes "Early Days of Esperanto

Princo Vanco (Putnam Kaj Beetes) .35 in England." (Esperante) \$1.00

Rozujo Ĉiumiljara (Wagnalls-Payson) .35 Surprises at Sylvia Farm-(H.W.Fisher) 15¢

Rakonto kaj Aventuro (Hall-Barcoll) .15 "Tezo Perdita" (15 min. play) 15¢

Taso de Amservo (Taylor) .35 SAVE MONEY ON MAGAZINE SUBSCRIPTIONS. New

Baha'u'llah kaj la Nova Epoko \$1.25 or Renewals - Club and Special Rates. Any

"Versaĵetoj" .25 offer you may see adver'ed will be matched

"Pirambo Kaj Tizbeo" (W.G. Adams) .10 or bettered (if by responsible agency).

(From "Midsummer Night's Dream") PHOTOGRAPHS of L. L. Zamenhof 5 x 7 25

or 5 for \$1.00 8 x 10, 65¢ - Postage Stamp

size, 12 - 15¢

JOSEPH R. SCHERER, author, lecturer and world traveller, saw and photographed the unusual, in almost fifty lands, tells about it in "Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo" cloth \$2.25, Paper, \$1.60 - plus postage, 15¢. Now writing a series of "Travel in America" articles in "Heroldo de Esperanto" dealing with his lecture tour through America. Subscriptions, 3 month \$1.10, 6 months \$2.00

Advertising rates for small announcements in "American Esperantist": Classified, 1¢ per word-minimum 25 words. Space, 1 x 3 1/2 inch, 50¢-3 insertions for \$1.00 Send copy by the 20th.

Kopioj de "Amerika Esperantisto" estos sendataj al kiu ajn adreso de Usono aŭ eksterlando kontraŭ sendo de neuzitaj usonaj poŝtmarkoj por 10 cendoj.

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A.--- and BRING IN A NEW MEMBER

Esperanto Association of North America - - - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.
